




Enhavtabelo	Paĝoj	Romano : Romantika renkonto en la RER B
La ferioj proksimiĝas aŭ jam eĉ alvenis por multaj el ni, periodo favora al la legado : tial ni proponas al vi prezenton de la unua libro de Pierre Collet, kiu rakontas apartan renkontiĝon en trajno.	1 kaj 2	« Mi sonĝis pri ŝi hieraŭ nokte. Ni ankoraŭ estis en la RER, ĉi-foje ŝi eltrajniĝis en la sama stacio kiel mi. Denfert Rochereau. Tio neniel ŝanĝis la aferon, ĉar ŝi antaŭeniris ne tre rapide, ĝenita de sia granda valizo. Malpli ŝarĝite, mi malsuprenkuregis la ŝtuparon, ĵetante kaŝrigardojn por certiĝi, ke ŝi restas en mia vidkampo. Ŝia ŝorto kaj ŝia ĉemizo estis anstataŭigitaj per robo, varianta inter ruĝo kaj koralkoloro, kun malgranda blanka floro brodita sur la koro, en la malantaŭo truo malkaŝanta iom el ŝia spino kaj malgrandan haŭtmakulon. Mi ankaŭ kredas, ke ŝi havis pendjuvelon. Aŭ kolĉenon. Ĉiukaze ŝia kolo brilis. Kiel ŝi povus nomiĝi? Emily? Amina? Eglantine? Chowa? Bérengère? Sonia? Laurie kun "au" aŭ Lorie kun "O"? »
Ni restas en la trajna kampo, ĉar la mallonga novelo " Rakonto pri tinitoj " okazas ankaŭ en trajno, sed la renkontiĝo plu daŭras ekster la trajno... Sed mi ne diras pli.	2, 3 kaj 4	La problemo - aŭ avantaĝo depende de via vidpunkto - de ŝtelrapidaj renkontoj en publikaj transportoj estas, ke oni nenion scias unu pri la alia kaj oni devas uzi sian imagon por plenigi la mankojn. Olivier Collet rakontas al ni la historion de renkontiĝo en la trajno RER B inter la flughaveno Roissy Charles de Gaulle kaj la centro de Parizo per la okuloj de la du protagonistoj. Knabo kaj knabino, kiuj ne interŝanĝis vorton, sed kiuj estis daŭre
Tiu dokumento temas pri la vivo kaj malfacilaĵoj de la virinoj en la Salum-delta (Senegalo). Ili plukas tie de jarcentoj konkon, la arkon, kiu ekmaloftiĝas kaj malgrandiĝas pro diversaj kialoj.	4, 5, 6, 7 kaj 8	
Tiuj herbejaj kuketoj, kiujn proponas Pierrette en sia recepto, estas vere bonegaj.	8	



impresitaj de tiu momento. Li sonĝas pri amo sen vere scii, kion li vere deziras, ŝi telefone dividas sian perturbon kun sia karamadino, kiu mem sonĝas la trovon de fratanimo. Du malsamaj formoj de rakontado, kiujn la aŭtoro sukcesas kunekestigi prudente.

Publikigita la 3an de oktobro 2022, tiu unua romano finfine rakontas eventon, kiu tre ofte okazas en la publikaj transportoj, kiam la invado de deziro perturbas la uzanton kaj lasas lin kun malordo, kiu daŭras longe post la finstacio. Tiu efemera renkonto, tiu miro, kiu okazas hazardrenkonte en trajno, memorigas la "Pasantinojn" de la poemo de Antoine Pol, famigita pro la adapto de Georges Brassens: "Al la vojaĝkunulino / Kies okuloj, ĉarma pejzaĝo /

Igas la vojon ŝajni mallonga / Kiun oni estas sola, eble, por kompreni / Kaj kiun oni lasas tamen eltrajniĝi / Sen esti tuŝetinta la manon »

Tiun resumon verkis Samuel Delziani kaj esperantigis Jean-Mary.

RER – Réseau Express Romantique de Olivier Collet. Eldonoj Le chant des voyelles. Prezo: 17 eŭroj. (2022)

El la revuo -La Vie du Rail- la 16a de decembro 2022

RAKONTO PRI TINITOJ

far

Aubry Françon

Petro vekiĝas kun ĝi kaj enlitiĝas kun ĝi. Ĝi akompanas Petron en ĉiuj liaj moviĝoj, sekvas lin laŭpaŝe, partoprenas en lia tuta vivo, por la plejbono kaj plejmalbono, cetere precipe por la plejmalbono. Ĝi estas Tiĉjo, kiel moknomis ĝin Petro, ambaŭflanka tinito je la proksimume 13000 herca frekvenco, kiu senĉese sonoras en la kapo de sia malbonsorta gasto, sekvaĵo de metalroka koncerto en ne tiom fora junaĝo, sed kiu ŝajnas nun datiĝi de la prahistorio. Fakte, daŭre havi la senton, kvazaŭ via meningo gastigas malnovan katodtuban televidilon tuttage fajfantan en la oreloj, tio ŝajnas esti nenio se tiel priskribite, sed tio putrigas vian ekzistadon ĝis antaŭtempe maljunigi vin tiom korpe kiom mense.

Petro tamen provis, eĉ suferis ĉion, konsultis la plej bonajn fakkuracistojn, ŝamanojn, druidojn, resanigistojn, magnetizistojn, elprovis ĉiujn medicinajn, alopatajn, paralelajn, tradiciajn, kaj kaŝmedicinojn, pasigis horojn por interrete aŭskulti blankajn pseŭdosonojn laŭdire kapablajn trompi lian cerbon, englutis multajn kemiajn produktojn kaj magiajn pulvorojn, sed nenio efikis.

Kiel ĉiumatene Petro pasigas kvin minutojn antaŭ la spegulo por kombi kaj razi sin. Malgraŭ la nevidebla handikapo, kiu elsuĉas lin, li konservis afablan facion, sed tamen markitan de latentaj angoro kaj kronika laciĝo, kiuj igas lin ŝajni pli aĝa ol liaj ĉirkaŭ tridek jaroj.

Petro forlasas sian domon, kie la invititoj, ankoraŭ pli la virinoj, estas malofteĝaj. Li piediras laŭ

ankoraŭ senhomaj stratoj, rompante la silenton per la ritma frotado de siaj ŝuoj sur la raspa trotuaro. Tiĉjo, lia embarasa kuniranto, estas tie, vere tie, malbona genio persekutanta liajn timpanojn, ĝino de liaj aŭdaj tuboj. Petro alvenas al la seninteresa ĉirkaŭurba stacidomo, kie li havas siajn kutimojn ege ankritajn : stampo de sia abonkarto por la trajno de la 7a h 07, ĉokolada trinkaĵo aĉetita en la varma angulo « ĉe avĉjo », kaj sensukera kafo kun kremo el la disdonilo. Poste venas la atendado sur kajo balaata de friduja nordvento, antaŭ ol la TER (*1) disvolvas sian girlandon de svingiĝantaj kaj knarantaj vagonoj. Poste perkubute Petro trabatas al si la vojon en la jam trookupita aleo. Hodiaŭ li bonŝancas ĉar li trovas sidlokon, altvaloraĵo kiun li ĝuas en laŭta elspiro de nedaŭra malstreĉiĝo.

Sur la fronta seĝo sidas juna virino, kiun Petro opinias belega. Li, kiu freŝdate spektis dokumentan filmon pri Makeda, reĝino de Ŝeba, demandas sin, ĉu la antikva regnestrino de Abisenujo ĵus ne reenkariniĝis antaŭ li. La bela fraŭlino, absorbita de la konsultado de sia kompufono, ne atentis pri Petro. Ŝiaj ĉarmo kaj gracieco tamen ne kaŝas daŭran malkomforton, kiu konkretiĝas en kompulsa kuntiriĝo de la makzeloj.

La trajno ekveturas. Petro profundiĝas en kontempladon de preterpasanta pejzaĝo, kies preskaŭ ĉiun angulon kaj kaŝangulon li konas.

Petro sentas sin bone. Li estas serena, kvieta. Subite Petro rektiĝas konsternite. Li ĵus ekkonsciis, ke Tiĉjo malaperis. Nur la klakado de boĝioj sur la

reloj kaj la obtuza voĉbruo de la interparoladoj akaparas lian aŭdkapablon. Unuafoje post multaj jaroj la malagrablega parazita bruo forvaporigis. Petro deziras krei pro ĝojo. Liaj lipoj larĝe ekridetas dum liaj okuloj direktiĝas al lia plaĉa vidalvidulino. Iliaj rigardoj renkontiĝas. Ŝi ŝajnas duone mirigita, duone amuzita. La ridgrimaco, kiu strekis la malsupron de ŝia vizaĝo, tute malaperis. La vangoj de Petro ruĝiĝas tiel rapide kiel termometro plantita en fluo de fandiĝanta lafo. En la sekundo, kiu sekvas, Petro, hontega, diligente kaj ekskluzive dediĉas sin al la detalega ekzameno de siaj ŝulaĉoj, nekapabla levi la kapon. Fine Petro kiel eble plej rapide foriras el sia loko ĉar venis la tempo eltrajniĝi.

Post kvaronhora piedirado Petro atingas sian laborejon kaj sian etan oficejon, kie atendas lin amaso da registrendaj fakturoj.

La morgaŭon, eliĝante el la brakoj de Morfeo, Petro konstatas, ke Tiĉjo revenis. La remito estis nur ĥimero, nedaŭra paŭzo en lancina kaj eterneca torturo.

Tri monatoj pasis kaj la vivo de Petro tute ne ŝanĝiĝis. Lia duopo kun Tiĉjo vivetas, vole nevole, en nek bona nek malbona situacio. Hodiaŭ la TER (*1) estas plenŝtopita. Petro provas rezervi al si minimuman, vivnecesan spacon, blokita inter ŝvelronda avino, ties aĉetĉareto kaj argentina dogo kun stinka buŝodoro. Subite la laŭtparoliloj aŭdigas anoncon de la kontrolisto. La trajno devas halti ĉe la venonta haltejo pro teknikaj kaŭzoj kaj dum nedeterminita daŭro. Meze de la koncerto de protestoj, kiuj akceptas la novaĵon, Petro klopodas por tekstmesaĝi al sia estro por informi lin pri la problemo. Kelkajn minutojn poste, la pasaĝeroj, preskaŭ ĉiuj incitegitaj, eltrajniĝas sur la kajon de malgrandega stacidomo ĉirkaŭfermita inter abiejoj kaj paŝtejoj.

Pacience atendente, Petro sidiĝas sur fosteton kaj malatente foliumas reklamflugfolion delonge kuŝantan en lia jakpoŝo. Subite li komprenas, ke la miraklo ripetiĝas : Tiĉjo forvaporigis. Tiam li perceptas spiradon en sia dorso, turnas sin kaj rigidiĝas pro stuporo. Mia etiopa princino ! Li ekkrias funde de si mem. Ŝi ŝajnas tiel miregigita kiel li kaj ili ambaŭ restas naivege mirkonsternitaj. Poste la ĝeno dissiĝas kaj ŝanĝiĝas en komunan ridegon.

Ŝi prezentas sin al Petro, tendante al li firman manon :

— Salma

— Petro, li respondas hezitante.

Peza silento revenas, malforte markita ambaŭflanke per nervozaj gorĝskrapoj. Fine la juna virino ekparolas :

— Petro, vi tuj opinios min ridinda, sed...-- Ŝi ĉesas paroli serĉante siajn vortojn-- tio estas ja la dua fojo, ke ni renkontiĝas, ĉu ne ?

Petro jesas per malrapida kapbalancado. Ŝi daŭrigas :

— Nu, kvankam tio povas ŝajni nekredebla, mi havas la impreson, ke via ĉeesto mildigas miajn tinitojn.

Petro observas ŝin, tre surprizita. Li faras vizaĝesploron, detalas ĉiun trajton, perdiĝas en la agatnigraj irisoj, kiuj sondas lin. Li pesas unu post la alia ĉiun vorton, kiun li estas prononconta. Finfine li decidiĝas kaj iom mallerte artikulacias :

— Sciu tion, mi kredas, ke vi havas la saman efikon sur min .

— Ĉu ankaŭ vi suferas pri tiu patologio ?

— Jes, de kiam mi troviĝis tro proksime de la laŭtegaj laŭtparolilaroj de la muzikgrupo Cotton Puppets of the Iron Age, Tiĉjo sekvas min laŭpaŝe. Almenaŭ ĝis via apero...

— Tiĉjo ? Ĉu vi baptis vian tiniton ? Tio estas strange komika.

— Jes, en ia limo, tio ebligas al mi relativigi la aferon, kiel la viktimo de sorĉo en la fabeloj por infanoj. Kaj vi, kiel tiu malbeno trafis vin ?

— Policanino mi estis, kaj fakte ankoraŭ estas, krom ke mi restas nun algluiĝinta al mia seĝo, malantaŭ mia komputilo. En mia malnova vivo, iun vesperon, dum mi patrolis kun mia kolego Patrico, en industria zono, ni surprizis du ŝtelistojn ĉe l' freŝa faro. Sekvis pafado. Patrico perdis la vivon kaj mi gajnis tinitojn. Ĉu rezulto de la submetiĝo al la decibelaj estigitaj de la pafoj aŭ psikologia traŭmatismo kaŭzita de la morto de mia kunteamano ? La kuracistoj ne kapablas respondi. Koncerne min, ĉiu sekundo de tiu senfina zumado rememorigas al mi Patricon agoniantan en miaj brakoj, senespere priserĉantan miajn pupilojn por ricevi respondon al sia nedifinebla angoro.

Petro silentas, trafita en la koro per la tragika rakonto.

La deviga halto de la TER (*1) finiĝas. La pasaĝeroj reiras al la vagonoj, dezirante rapide

fermi tiun malagrablan parentezon. Por Petro kaj Salma, ankoraŭ tro fruas por disiĝi. Ili daŭrigas en la trajno la interparoladon komenciĝintan en nekonvena maniero momenton antaŭe. Bedaŭrinde, jam estas tempo por Petro kolekti siajn aĵojn kaj saluti Salman. Dum li kontraŭvole prepariĝas direktiĝi al la plej proksima elirejo, la juna virino alkroĉiĝas al lia brako :

— Petro, se ni estas kuracilo unu por la alia, ni ne povas kontentigi nin per tia adiaŭo...

La natura timideco de Petro revenas kaj li balbutas :

— Jes, sed kiel fari ?

Kun maliceta kaj enigma mieno Salma respondas :

— Mi ja havas mian ideon pri la demando...

Tiutage Petro maltrafis sian haltejon sed Tiĉjo foriris. Por ĉiam.

*1 : TER : Trajno Ekspresa Regiona, france Train Express Régional

Tiun novelon aperintan en la retejo "short-edition.com" esperantigis Jean-Mary

En Senegalo, virinoj kaj konkoj

En la Salum-delta, virinoj plukas la arkon, konkon, kiu estas la ĉefa ekonomia riĉofonto de la regiono. Alarmite de ĝia maloftiĝo, sciencistoj penas savi ilian aktivecon.



Virinoj el la insulo Falia, plukantaj arkojn, konkojn proksimajn al la kardioj.

En la pirogo la miksitaj voĉoj de la konkoplukistinoj preskaŭ kovras la zumegon de la eksterboata motoro. « *Oni kantas por kuraĝigi sin* », komentas Fatou Sarr, staranta en sia longa robo el hela kotono sur la antaŭo de la boato. En la serera lingvo, parolata sur tiuj senegalaj insuloj, la plukistinoj prikantas la laboron, la nutran maron, la virinan kuraĝon kaj sian « konkolandon ». Ili estas ĉirkaŭ dudek, kunpremitaj sur lignaj sidlokoj, survoje al sablobenko, kie ili plukos la konkon, kiu vivigas ilin, la arkon. La plukado de tiu molusko, proksima de la kardio, kun distingaj ripoj kaj dika ŝelo, estas atestita de almenaŭ 2000 jaroj sur la marbordoj de la Okcidenta Afriko. En la Salum-delta, labirinto de insuloj, mangrovaj kaj lagunaj en suda Senegalo, la arkoj estas ĉie. Ili tegas la plankon de la stratetoj, splite eliĝas el la dommortero kaj formas montetojn. « *Se vi forprenas la konkon, ĉi-tie, nenio plu estas* », resumas Malick Diouf, biologo en la universitata instituto pri fiŝkaptado kaj akvokulturo en Dakaro. La loĝantaro

baldaŭ enŝovas brilajn arkojn en siajn korbojn. Tiuj virinoj vivas laŭ la ritmo de la tajdoj. Sed de du jardekoj ili maltrankvile observas la malpliigon de la riĉofonto : la arkoj estas malpli kaj malpli multaj, kaj pli kaj pli malgrandaj. Ĉu tio estas la konsekvenco de la klimata ŝanĝiĝo aŭ de la troekspluatado de la konko ?

Eĉ antaŭ ol serĉi kialon de tiu malkresko, la plukistinoj starigis administrajn disponojn, precipe la fermon de la plukado dum la reproduktada periodo. Fatou Sarr estas lucida : « *oni provas pli bone valorigi por malpli elpreni* ». Ĉar la estonteco de la insuloj, ege trafataj de la kamparana elmigrado, dependas de la supervivo de tiu manfarita plukado. Multnombraj insulaninoj foriras al Dakaro, kie multaj estas domservistinoj. Kaj kvankam la elmigrado al Eŭropo estas ĉefe vira, iuj virinoj ankaŭ provas. « *Ĉiuj junuloj havas tiun revon, apartenas al ni rompi ĝin per kreado de laborpostenoj*, martelas Fatou Sarr. *Ni havas marfruktojn, arbarfruktojn. Ni sukcesos !* »



de la insuloj de tiu estuaro vivas el la maro. Kiam la viroj foriras demeti siajn retojn marmeze, la virinoj praktikas la konkoplukadon. En Niodior, insulo de 5000 loĝantoj, 700 konkoplukistinoj, t.e. 40 % de la ina loĝantaro en la aĝo labori, plukas la arkon.

Administraj disponoj

La vilaĝa minareto malproksimiĝas. Baldaŭ nur mangrovo ankoraŭ ĉirkaŭas nin. La grupo eklaboras. Post rapida grundosondado, la plukistinoj

Kiel la konkoplukistinoj, ankaŭ la biologoj demandas sin pri la malkresko de la arko. Yoan Thomas, ekologo ĉe la laboratorio pri marmediosciencoj en Brest (Finistero), studas tiun moluskon de kvin jaroj kaj gvidas ambician partoprenan sciencan programon en la Salum-regiono kun profesiiulinoj. « *Tiu aktiveco estas gravega por la lokaj komunumoj, tamen la ekologio de tiu besto estas malbone konata. Ni provas kompreni la populaciodynamikon de tiu konko, kiel ĝi reagis al variaĵoj en akvotemperaturo aŭ saleco,*

ekzemple, por provizi la insulanojn per iloj por pli bone administri la riĉofonton. »

Premo sur la riĉofonto

Por la biologo temas pri ekzamenado de la efiko de mediaj fluktuoj sur la arko, sed ankaŭ pri mezuro de la plukataj kvantoj kaj ties evoluo. Ĉar, de pornutra, plukado fariĝis komerca, kreskigante la premon sur la riĉofonto. « Ni serĉas metodon por starigi

al ni paroli pri la vivciklo, pri tio, kion ili observas siaflanke. » Djeye Sarr apartenas al la konkoplukistinoj de Niodior implikitaj en la programo. « Mi plukas de ĉiam, kaj mi havas sciojn pri la arko, sed la eksperimentoj kun la sciencistoj ebligas al ni scii novajn aĵojn, ŝi diras kun siaj du manoj mergitaj en la sablo. Per prisemado de parko, ekzemple, ni komprenis, ke la arko kapablas moviĝi. »



observadon de la ĉiutagaj elboatigoj. Klaras, ke la ekspluatado havas efikon sed ĝi ne estas la nura kialo. La klimata ŝanĝo kaŭzas multajn ŝanĝojn sur la ekosistemo de tiu estuaro : marborda erozio, modifiĝo de pluvokvanto, plivarmiĝo, ktp, »

Tri konkoplukistinoj flankenlasis sian grupon hodiaŭ vespere por akompani la biologon en eksperimentan parkon, limdifinitan per branĉoj de mangloarboj. Post kiam la loko estis tute malplenigita, ĝi estis prisemita en 2019 per milo da arkoj maturaj kaj junecaj. Ĉiun sesan semajnon, Babacar Sané, doktoreca studento, kiu dediĉas sian tezon al arko, venas elpreni tie bestojn por analizi la kreskon, la ŝelon kaj la karnon. Ĉirkaŭ la parko konkoplukistinoj kaj sciencistoj malfaldas kadron por streki unukvadratmetran parcelon, en kiu ili kolektas ĉiujn konkojn. Poste ili purigas la bufrozoonon, kiu ĉirkaŭas la parkon kaj devas resti virga.

« Tiuj momentoj sur la tereno kun la virinoj estas tre gravaj, akcentas Yoann Thomas. Ili ebligas

STATO DE LA EKOSISTEMOJ

Dum la konkoplukistinoj daŭrigas la rikolton, la sciencistoj instalas la mezurilojn, kiujn ili kunportis : eksperimentajn sondilojn kun malmultekosta kaj malalta teknologio, elpensitajn kaj fabrikatajn en Bretonio. Nutrataj per sunpanelo, diversaj sensiloj (salineco, temperaturo, premo, malklareco kaj fluoreskeco) estas kaŝitaj en ordinara PVC-tubo. Kompletigite, la planoj de tiuj aparatoj estos alireblaj por ĉiuj kaj senimpostaj. « Havi ideon pri la nuna stato de la ekosistemoj estas nepre, des pli, ĉar grava petrola enmara projekto komenciĝas ĝuste antaŭ la enirejo al la Salum-delta », diras Yoann Thomas.

La tajdo realtiĝas, estas tempo repreni sian lokon sur la pirogo. Pri la konkoplukistinoj, la laboro ne haltas tiam. Ili devas ankoraŭ malŝarĝi siajn pezajn pelvojn da konkoj sur la haveno Niodior. Ĉe la elŝipiĝejo la grundo tute kovrita de arkoj grincas sub la paŝoj. Revenante el la maro,



cento da konkoplukistinoj direktiĝas al granda konstruaĵo, transformejo por la mar- kaj arbarproduktaĵoj. Tie ili fabrikas konfitaĵojn kaj siropojn kaj kuiras la konkojn. Malgrandega parto de la arkoj estas konsumataj freŝaj. La plej granda parto de la rikolto estas surmerkatisata seka en la tuta lando por agrabligi la saŭcojn. La insulanoj vendas po 2000 AFK-ajn frankojn (3 €) por unu kilo da sekigita karno, kio reprezentas 22 kg da tutaj konkoj. Ĉiuj plukistinoj de Niodior ne vizitas tiun lokon konstruitan helpe de kanada disvolva programo. Iuj kuiras kaj sekigas la konkojn hejme. Trairante krepuske la vilaĝon, oni vidas grandajn potojn da arkoj sur lignofajroj, oni aŭdas la bruon de la konkoj pasantaj tra kribriloj por apartigi la ankoraŭ varmegan karnon disde la ŝelo.

VALORIGO DE LA RUBOJ

La konkoplukistinoj valorigas tiujn rubojn per vendo al la konstrusektoro. Antaŭe la insulanoj libere servis sin el la konkaj amasoj. Esceptaj pruvajoj de la historio de la insuloj, tiuj proksimume dek metrojn altaj montetoj formiĝis per konkoakumuliĝo. Sur ties suproj kreskas baobaboj, avidaj pri kalka grundo. Iujn lokojn prifosis arkeologoj. Ili malkovris tie ostojn, kiuj pensigas, ke tiuj lokoj estis kunligitaj kun funebraj kutimoj. Sur la supro de la amaso de la insulo Falia, proksima de Niodior, Yoann Thomas trovas sur la grundo konkon da ĉirkaŭ dek centimetroj, multe pli grandan ol tiuj nun plukataj. Laŭ la biologo tiuj rezervoj de la pasinteco estas altvaloraj pruvajoj : « *Sen scii tion, la konkoplukistinoj specimenis por ni de jarcentoj !* »

Fajrorestaĵoj estis elprenitaj sur la diversaj amasotavoloj kaj datitaj per karbono 14, kio ebligas scii en kiu periodo la arkoj de la sama stratumo estis plukitaj. Per tiuj datumoj la sciencistoj povas havi ideon pri la evoluo de la plukitaj kvantoj sur 2000 jaroj. Distranĉite en laboratorio, la konkoj, iafaje maljunaj je pluraj miloj da jaroj, liveras multajn informojn kaj permesas reiri en la tempo. Kiel arbo markas en la trunkokoro la historion de sia kresko, la arko ĉesas kreski dum la musonsezo, kio formas malhelan strekon sur ĝia konko. Ankoraŭ pli vertiĝodona, oni povas legi sur ĝi la tajdociklon pli



malpli je 12 h, ĉar la arko, kiu seniĝas je regiono, la arko fariĝas ilo por pli bone kompreni la fitoplanktono dum la malalta maro, ĉesas grandiĝi. mediajn ŝanĝiĝojn.
« Tio estas surprizega !, konfesas la ekologo. Tio Tiun dokumenton aperintan en la revuo "La donas al ni gravajn informojn pri la klimato kaj Vie" (28a de aprilo 2022) esperantigis Jean-Mary starigas pligrandskalajn demandojn. » Fundamenta Tekstoj : Virginie de Rocquigny ekonomia riĉofonto por la virinoj de la Salum- Fotoj : Constance Decorde/Hans Lucas

HERBEJAJ KUKETOJ

(por 28 ĝis 30 kuketoj)

220 g da duonbrana faruno aŭ da spelteta faruno
2 supkuleroj da migdala faruno
1 saketo da gisto aŭ da natria hidrokarbonato
115 g da sukero
125 g da salita butero fandita
1 ovo
30 g da grajnoj de papavo
30 g da rostitaj grajnoj de sezamo

1 - Miksi farunojn , giston kaj sukeron

2 - Enkorpigi la fanditan buteron, la ovon kaj la grajnoj.

Miksi ĝis ekhavi homogenan paston

3 - Formi kolbason de 4 cm de diametro per tiu pasto kaj envolví ĝin per nutra plastfolio

4 - Malmoligi ĝin dum 30 min en fridujo

5 - Ŝalti la fornon je 180° C

6 - Eltranĉi rondpecojn de 1 cm de dikeco kaj demeti ilin sur kuiradplaton kovritan per kuiradpapero

7 - Enfornigi la kuketojn dum 10 min kaj tuj eltiri ilin

Bonan gustumadon !

Tiun recepton proponis Pierette Formen.

